# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2001 numero 2-a: marto / aprilo



Redakcio:
Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
Retpoŝto: gacond@bluewin.ch
✆ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND


# Du gravaj kunvenoj:

## 24-an de marto
## La Chaux-de-Fonds: CDELI
## Rendevuo kun Herbert Mayer

la direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (Aŭstrio)

Informoj: paĝoj 13-a kaj 14-a

## 7-an de aprilo
## Bern: Rendevuo de aktivuloj kaj Ĝenerala Kunveno de SES

Kongresejo Galaxy, Effingerstrasse 20, salono Nemo

Informoj paĝo 4-a ĝis paĝo 12-a

# Rememorigilo

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen/Bern. ✆: 031 921 44 59. Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.
Perla MARTINELLI, Vicprezidanto, BP 232, 6830 Chiasso. Retpoŝto: heroldo@tin.it.
Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne. ✆: 021 653 14 67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.
Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds. ✆: 914 39 34. Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.
Dietrich WEIDMANN, kunlaboras en la informado, PF 301, 8034 Zürich. ✆: 01 251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4
Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

| Paĝo | Neesperantistoj & komercaj | Esperantistoj & nekomercaj |
|---|---|---|
| 1/8 | CHF 40 | CHF 20 |
| 1/4 | CHF 70 | CHF 35 |
| 1/2 | CHF 110 | CHF 55 |
| 1/1 | CHF 180 | CHF 90 |

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

Por *SES informas* N° 2001-3 (majo-aŭgusto): 20-a de aprilo.
N° 2001-4 (septembro-oktobro): 20-a de aŭgusto.
N° 2001-5 (novembro-decembro): 20-a de oktobro.
N° 2002-1 (januaro-februaro 2002): 20-a de decembro 2001.
N° 2002-2 (marto-aprilo 2002): 20-a de februaro.

## Sendo nekutima

Tiu ĉi numero 2001-2 de *"SES informas"* atingis vin en koverto kun la ĉi-sekvaj akompanaĵoj:

1) Poŝtkarto invitanta vin aliĝi al la Ĝenerala Kunveno en Bern. Ĝi instigu vin alporti aktivan apogon al la poresperanta aktiveco de SES.
2) Reklamilo verda veninta el Hungario, kiu instigu al novaj lernaj kaj feriaj kontaktoj.
3) Kaj fine kolektiva letero kun poŝta bulteno ĉeka invite al kotizado por la jaro 2001. Vi malavare akceptu ĝin!

# Svisa kalendaro

## Marte

13 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
15 LES Kunveno Luzern
21 Neŭŝatela kantono: fondua vespero kun Herbert Mayer
24 La Ch-de-Fds CDELI studsabato
27 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
31/1 aprilo La Ch-de-Fds: KCE Asembleo de LF-koop kaj monatfino

## Aprile

07 Bern: Ĝeneralaj Kunvenoj de SAEF kaj SES
12-16 KCE kurs-sesio La Ch.-Fds
13-17 SAT-Amikaro 56-a Kongreso en Chambéry (Francio)
19 Luzern LES Kunveno
20 Redakta datlimo por *SES informas*
20-22 Mulhouse printempa staĝo
25 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
28-29 La Ch-de-Fds KCE monatfino

## Maje

10 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
17 Luzern LES Kunveno
19 La Ch-de-Fds CDELI studsabato
24-27 La Ch-de-Fds KCE Internacia komunista konferenco
26-27 Rheineck KCE monatfino

## Junie

13 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
16 La Ch-de-Fds CDELI studsabato
21 Luzern LES Kunveno
23-24 La Ch-de-Fds KCE monatfino
27 La Ch-de-Fds CDELI studrondo
30 Luzern LES Ekskurso
30/1 julio Ch-Fds KCE monatfino

## Julie

14-20 SAT 74-a Kongreso en Nagykanizsa en Hungario
14-23 Intenacia Eo-Konferenco pri Karolo Piĉ en Straznice, Ĉeĥio
17 ĝis 20 aŭgusto Ch-de-Fds KCE kurs-sesio
21-28 86-a Universala Kongreso de Esperanto Zagreb en Kroatio
29 ĝis 5 aŭgusto 57-a TEJO-Kongreso Strasbourg en Francio

## Aŭguste

20 Redakta datlimo por *SES informas*
23 Luzern LES Promenada kunveno

## Septembre

20 Luzern LES Kunveno
22 La Ch-de-Fds CDELI stud-sabato

## Oktobre

18 Luzern: LES Kunveno
20 Redakta datlimo por *SES informas*
20 La Ch-de-Fds CDELI studsabato

## Novembre

15 Luzern LES Kunveno
17: La Ch-de-Fds CDELI studsabato

## Decembre

05 Luzern: LES Zamenhofa festo
20 Redakta datlimo por *SES informas*

## 2002

## Januare

18 Luzern LES Kunveno

## Februare

20 Redakta datlimo por *SES informas*

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 20-a de aprilo, por ke ili troviĝu la taŭga rubriko kaj en la svisa kalendaro de *"SES informas"* 2001-3 (majo-aŭgusto 2001).

# Vivo de SES

# SES-Tago en Bern

Kongresejo Galaxy, Effingerstrasse 20, salono Nemo
Sabate, 7-an de aprilo 2001

11h00 Rendevuo de aktivuloj.

La estraro prezentos la celaron, kiu entenas la akcentojn de la societa aktiveco. Ni diskutos pri nia strategio.

Claude Gacond informos pri la plano por la Agado 2003.

12h30 Tagmanĝo


14h15 Ĝenerala Kunveno laŭ la aldonita tagordo

16h30 Kafumado

Grave

Ni petas vin antaŭanonci vian venon ĝis fine de marto per la poŝtkarto aldonita al la bulteno *"SES informas"*.

La kongresejo Galaxy troviĝas 10 minutojn piede de la stacidomo. Eliru tra la elirejo Christoffel. Vidu la urban skizon.



# Tagordo de la Ĝenerala Kunveno

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno 08.04.2000 en Luzern, kiu aperis en *SES informas* 2000-3.
4. Jarraporto, jarkalkulo, bilanco 2000 kun raporto de la kaskontrolantoj. (Ili estos disdonitaj komence de la kunveno).
5. Buĝeto 2001. (Ĝi estos disdonita komence de la kunveno.)
6. Propono pri la kotizoj ekde 2002. La lastjara kunveno komisiis la estraron ekzameni la kotizan problemon kaj kontakti tiucele la grupojn. Ni enketis inter la membraro pri la revuo *Literatura Foiro* (LF). Respondis 81 personoj, la duono de la membraro. Unue: 74 membroj subtenas la ideon krei du kategoriojn: membroj kun LF kaj membroj sen LF. Nur 7 membroj kontraŭas. Due: 25 membroj deziras plu ricevi LF-on, 50 ne plu. Sekve la granda plimulto deziras, ke la abono al LF estu libervola, ne kolektiva. Tio malaltigos la kotizojn por la membroj sen LF. Ni proponas jenajn bazajn kotizojn:

| Ĝis nun en CHF | | Ekde 2002 en CHF |
|---|---|---|
| 12.- | ĝis 18 jaroj | 10.- |
| 25.- | 19-29 jaroj | 20.- |
| 70.- | ekde 30 jaroj | 35.- |
| 45.- | emeritoj | 35.- |
| 100.- | geedzoj | 50.- |
| 65.- | geedzoj emeritaj | 50.- |
| 1400.- | dumviva membreco | 700.- |

Membroj kun LF pagos la bazan kotizon plus rabatitan abonprezon por LF, kiu ne ankoraŭ estas konata. Samtempe ni volas simpligi la kotizaron havonte la saman kotizon por profesiuloj kaj emeritoj, ĉar la kotizo estas nun malalta. Tio necesigas adapton de la statuto.

Tiu solvo pli bone respektos la bezonojn de la membraro, plibonigos la financan situacion de la societo kaj malfermos la vojon al novaj organizaj

strukturoj. La grupoj de Geneve, Basel kaj Wil jesis la novajn kotizojn. Neniu kritiko alvenis. Esperanto-Societo Zürich jam lastjare proponis malaltigi la kotizojn.

7. Adapto de la statuto, artikolo 8 kotizoj, literoj b kaj d. Post akcepto de la novaj kotizoj necesos forigi la substrekitajn vortojn, ĉar emeritoj ne plu pagas reduktitan kotizon. Literoj b kaj d tekstas jene:

b) infanoj aŭ geknaboj, junuloj, emeritoj kaj geedzoj pagas reduktitan jarkotizon.

d) Por esti dumviva membro oni devas unufoje pagi la 20-oblon de la baza kotizo. Por emeritoj temas pri la 20-oblo de ilia reduktita baza kotizo.

8. Diversaĵoj.

## La Estraro informas

# Jarraporto 2000

La Ĝenerala Kunveno okazinta la 8-an de aprilo 2000 en Luzern elektis jenan **novan estraron** por trijara oficperiodo:

Bruno GRAF, prezidanto, Ittigen / Bern.

Perla MARTINELLI, vicprezidanto, Chiasso.

Nicole MARGOT, sekretario, Lausanne.

Elisabeth LAUPER, kasisto, La Chaux-de-Fonds.

Dietrich WEIDMANN, komisiito pri informado, Zürich.

La estrara kunsido de la 17-a de junio 2000 en Bern aprobis **celaron** por la periodo 2000-2002, kiu metas akcentojn en la agado kaj servas kiel labor-programon. La celaro aperis en la numero 2000-4 de nia bulteno *SES informas*. Nova celo estas malfermi diskuton pri eventuala federiĝo de ĉiuj esperanto-realaĵoj en Svislando.

Grava movadpolitika kunveno pri la **Esperanta Civito** okazis la 12-an de februaro en Bern. Giorgio SILFER prezentis la Esperantan Civiton kaj pledis por ĝi dum Bruno MASALA kaj Bruno GRAF esprimis la dubojn kaj kritikojn. Ampleksa raporto troviĝas en la numero 2000-2 de nia bulteno.

Dieter ROOKE iniciatis kaj prizorgas la **interŝanĝon de vid- kaj son-bendoj kaj de aro da gazetoj**. Ni uzu tiun servon pli ofte kaj regule por praktiki la

lingvon kaj informiĝi pri la bunta vivo en Esperantio. Jen la adreso kun la nova stratnumero de la peranto por preni kontakton: Dieter ROOKE, Aeussere Klus 14, 4702 Oensingen.

En la numero 2000-2 de nia bulteno aperis koncepto pri kreota Esperanto-Amikaro. Temas pri interesuloj, kiuj iel simpatias al esperanto, sed ne necese lernos la lingvon. SES havas intereson ligi libere tiajn personojn al nia movado ekstere de statuta konsidero, por esti ĉirkaŭita de subtenantaro. Tiucele aperos nacilingvaj folioj en nia bulteno sub la titolo *ESPERANTO? - JA, OUI, SI!*

Claude GACOND organizis en CDELI La Chaux-de-Fonds regule interesajn studsabatojn prilingvajn (principe la 3-an sabaton de la monato). Kelkfoje ankaŭ okazis prelego de elstara vizitanto. En majo parolis Ed BORSBOOM (Nederlando) pri nuntempaj verkistoj, precipe pri la ibera skolo. En novembro instruis André GROSSSMANN (Francio) kiel esperantigi la propran komputilon por ke ĝi kapablu tajpi la supersignojn.

La farita enketo pri la kolektiva abono al *Literatura Foiro* donis klarajn rezultojn. 74 membroj subtenis la ideon krei du kategoriojn: membroj kun LF kaj membroj sen LF; nur 7 membroj neis. Konklude la granda plimulto preferas libervolan abonon. 25 membroj deziras ankaŭ estonte ricevi la revuon LF dum 50 ne plu deziras ricevi ĝin.

Regionaj kunvenoj okazis belsukcese en Zürich kaj Genève. Esperanto-Societo Zürich organizis la 23/24-ajn de septembro orientsvisan semajnfinon kun prelegoj de Claude GACOND pri la temo "Esperanto radiografie" kaj kun bunta distra programo. En Genève La Stelo kune kun SES okazigis je la 7-a de oktobro kulturan sabaton. Uwe Joachim MORITZ kaj Alain FAVRE prelegis pri la problemoj de etnaj minoritatoj en Eŭropo.

Rimarkindaj estis la publika agado kaj informado. La maja numero de *Résonnances*, porinstruista gazeto de la kantono Valezo, traktis la temojn Esperanto kaj Europanto en diversaj artikoloj verkitaj interalie de Claude PIRON kaj Claude GACOND. La redaktoroj de la gazeto raportis mem tre objektive kaj sendepende. Finfine ankaŭ aperis oktobre en la romanda porinstruista gazeto *L'Educateur* la depost longe atendita artikolo de Mireille GROSJEAN sub la titolo *"Une autre variante: l'espéranto"* kaj sub la pseŭdonomo Sophie

GRAUBERT. Ni pretigis kaj sendis ankaŭ germanlingvajn artikolojn al aliaj redakcioj kaj atendas ilian publikigon. Vera kaj surpriza sukceso estis la publika prelego de Claude PIRON *"Les langues: un monde fascinant"* en UNI Mail Genève la 21-an de septembro, organizita de La Stelo kaj kunfinancita de SES. 120 personoj plenigis la salonon.Tagon antaŭe aperis en la taggazeto *Le Temps* plenpaĝa artikolo de ĵurnalisto kun la provoka titolo *"L'anglais est la langue la plus inadaptée à la communication internationale"*. La redaktisto estis intervjuinta Claude PIRON kaj Marion BÉLISLE, kiu parolas esperantlingve kun sia filo Romain en La Chaux-de-Fonds.

La laborgrupo pri varbado kunsidis la 9-an de decembro en Bern. La grupo diskutis la novajn gvidliniojn por informado de UEA, kiuj aperis en la revuo *Esperanto* 2000-10, ekzamenis kaj aprobis novan germanlingvan tekston por varbilo, decidis pretigi materialon por standagado kaj proponas nacilingvajn prelegojn okaze de la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001.

Mi dankas al ĉiuj bonvoluloj, kiuj subtenis nian societon per laboro aŭ per donaco.

La prezidanto: Bruno GRAF

# Donacoj

Donacoj en CHF al SES: Werner LÄDERACH, Zürich: 20; Verena MALLEPELL, Unterehrendingen: 30; Roland MISEREZ, Grand-Lancy: 20; Konrad REY-ZOLLINGER, Luzern: 250; Henri WETTSTEIN, Versoix: 15;. Sume: 335.

Donacoj en CHF por la Agado 2003: Anne-Marie BRINER, Genève: 30; Henri WETTSTEIN, Versoix: 15. Sume: 45.

Krome Konrad REY-ZOLLINGER, Luzern donacis specialajn poŝtmarkojn por valoro de CHF 140.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER dankas tiujn donacintojn pro ties malavareco.

## Uzu Esperanto-poŝtmarkojn

Okaze de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Luzern la svisa poŝto eldonis en 1979 specialan poŝtmarkon je valoro de po 70 centimoj. Tiu ĉi montras esperanto-balonon sur verda fono. Tiuj poŝtmarkoj, kiuj restas validaj, fariĝis filatela raraĵo.

SES transprenis stokon de UEA por vendi tiujn poŝtmarkojn al siaj membroj. Mendu folion de po 50 markoj ĝirante CHF 35.- al nia

poŝta ĉekokonto 17-581908-4, Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds, kun la nepra indiko "poŝtmarkoj". Nia kasistino Elisabeth LAUPER, rue de la République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds prizorgos la dissendon.

La prezidanto: Bruno GRAF

# Agado 2003

## Buĝeto

La ideon por la Agado 2003, kiu celas festi la centjariĝon de SES, lanĉis Claude GACOND en 1987, kiam li devis transpreni la prezidantecon de SES kaj tiam bedaŭre konstatis, ke nenio estis antaŭplanita por marki la centjaran jubileon de esperanto per agoj profitigaj por la estonteco mem de la svisa esperanto-movado.

Sekve al tio la Estraro de SES decidis en 1993 a) krei fonduson por la Agado 2003, kaj en 1995 b) ĝiri jare po CHF 1000.- al tiu fonduso el la propra kapitalo de SES. Kaj tiel jaron post jaro kolektiĝis donacoj por la Agado 2003 cele al la kreskigo de rezerva monsumo.

Alvenas la momento buĝeti la antaŭviditan agadon por la realigo de kelkaj projektoj. Por ĉiu el la sekvaj Claude GACOND daŭrigos sian aktivecon sin ĉirkaŭante de la necesaj kompententuloj.

UNUA PUNKTO: *"Enciklopedio pri esperanto kaj interlingvistiko en Svislando"*. Ekde pluraj jaroj Andy KÜNZLI kolektadas dokumentaron pri la svisaj esperantistoj kaj pri la svisaj adeptoj de la diversaj planlingvaj projektoj. Ĉe CDELI li trovis parton de sia dokumentaro, sed ankaù per rektaj esploroj ĉe aliaj bibliotekoj kaj ĉe komunumaj administrejoj li povis kreskigi ĝin. El la koncerna materialo li jam redaktis diversajn eseojn, kiuj aperis en festaj libroj. Ĉiuj liaj verkoj pruvis la seriozecon kaj objektivecon de liaj esploroj. Andy KÜNZLI estas nuntempe la plej kompetenta historiisto pri la disvolviĝo en Svislando de la planlingvoj volapük, esperanto, ido, occidental kaj interlingua Sed liaj esploroj ofte superis liajn financajn eblojn, el tio kelkfoje naskiĝis senkuraĝiĝoj tute kompreneblaj. Kun la espero, ke li povos retrovi la necesan verkemon cele al la maturigo de eldonebla enciklopedio por la jaro 2003 Claude GACOND proponis dediĉi al tiu agado kontribuon de CHF 10'000 el la kapitalo de la Agado 2003. Interkonsento fiksos la rajtojn kaj devojn inter SES kaj Andy KÜNZLI, kiu konservos

propran aŭtonomion por elekti taŭgan eldoniston kaj por decidi kun li pri la definitiva titolo, pri la aspekto, pri la prezo, ktp. de la enciklopedia verko, kiu estos proksimume 300-paĝa. Por tiu aktiveco Claude GACOND estos la peranto inter SES kaj Andy KÜNZLI.

DUA PUNKTO: Pretigo de mini-libroj surtrate vendeblaj okaze de propagandaj agadoj kaj kies ekzisto favoros ĉiujare la lanĉon de "Tago de Esperanto", kies dato devos esti elektita por povi efiki en Svislando. La taŭga formato de tiuj ĉi mini-libroj devus esti tiu de *"Dictionnaire de poche français-esperanto & esperanto-français"* de SAT-Amikaro, kiu povus koni apartan eldon-karakteron pere de kun-laboro kun SAT-Amikaro, por naski mini-leksikonon por la franclingvanoj en la mini-kolekto. Claude GACOND antaŭvidas saman kromeldonan adapton de la vortareto *"Deutsch-Esperanto / Esperanto-Deutsch"* de Aŭstria Esperanto-Movado. Kaj aldone li antaŭvidas la iompostioman redaktadon kaj eldonadon de mini-libroj pri la sekvaj titoloj: *"Mini-romano en esperanto"*, *"Mini-historio de esperanto"*, *"Mini-kurso de esperanto, por franclingvanoj, por germanlingvanoj, por itallingvanoj kaj por romanĉlingvanoj"*. La vendo mem de tiuj mini-libroj devos nutri re-eldonan fonduson, kiu ebligos jaron post jaro daŭrigi la agadon proponante novajn titolojn. Ĝi devos ankaŭ ricevigi al la vend-antoj ian profiteton. Por ke tiu ag-ado alvenu al reala konkreta rezulto en 2003 devas esti antaŭ-vidita buĝetado de minimume CH 10'000. Por ĉiu lingvo Claude GACOND sin ĉirkaŭas de kompetentaj konsilantoj kaj kun-laborantoj. Inter ili menciindas jam nun Richard SCHNELLER, kies fakeco tipografia kaj kies profesia aktiveco en presejo estas gravaj kaj kies dulingveco germana-franca estas fundamenta. Aliaj kontaktoj rilate al la verkado mem de tiuj mini-libroj estas jam antaŭ-viditaj, sed pri ili Claude GACOND deziras konservi plenan agad-liberon antaŭ ol ilin mencii.

TRIA PUNKTO: La manko de preciza informa materialo por la instrumedioj, por la redakcioj gazetaraj, radiaj kaj televidaj, malfavoras nian movadon en Svis-lando. Tial estas antaŭvidita la publikigo de dosieroj disdoneblaj okaze de neceso. Sub la titolo *"Découverte de l'espéranto"* Claude GACOND pretigas tian dosieron por la franclingvanoj. Ĝis nun ĉiuj liaj provoj instigi al

la verkado de similaj dosieroj german- kaj ital-lingvaj montriĝis senrezultaj, tial paralele al la kontroligo de la franclingva dosiero fare de fakuloj li serĉas kunlaborantojn, kiuj pretos ĝin traduke adapti por apero en eldonoj germana, itala kaj eĉ romanĉa. Claude GACOND konsideras, ke tiu ĉi inform-materialo havas karakteron informan, kaj ke la eldono de la koncernaj dosieroj devos esti konsiderata de SES mem kiel propaganda elspezo. Tial li buĝetas nur agadsumon de CHF 2'000, kiu helpu kovri redaktajn kaj kontaktajn kostojn. Kaj kiam dosiero estos eldonebla, tiam la Estraro de SES decidos, eble laŭ mon-apogoj ricevataj sekve al siaj alvokoj, kiom ĝi povos investi cele al ties disdono per bone antaŭplanitaj agadoj. En sia aktiveco de arkivisto de CDELI Claude GACOND havis plurfoje la malagrablan surprizon konstati, ke propagandiloj disdonitaj al la lokaj grupoj neniel estis utiligitaj informcele. Plenaj neutiligitaj skatoloj kuŝadas en arkivaĵoj ricevitaj okaze de translokiĝo aŭ morto de esperantistoj. Li volas absolute eviti tiajn malŝparojn kaj ankaŭ deziras povi formi la utiligontojn de la koncernaj dosieroj cele al ties protekto kontraŭ fuŝuzo fare de nekompetentaj propagandistoj.

KVARA PUNKTO: Perkorespondaj kursoj poŝte kaj rete alireblaj. Claude GACOND esperegas, ke ĝis 2003 pli konvene funkcios perkorespondaj kaj perretaj kursoj en Svislando. Sed persone nur pri la franclingva li laboras, reverkante novan version de sia *"Perkoresponda kurso por franclingvanoj"*, kiu estos uzebla poŝte kaj rete. Li esperas, ke io simila fine ankaŭ funkcios en la aliaj lingvaj teritorioj de Svislando, kvankam li sentas, ke vigle mankas la necesaj agantoj didaktike kompetentaj. Tial li alvokas, por ke siaflanke SES mem buĝetu agadsumon, kiu konduku al la iompostioma solvado de la koncerna problemo en kunlaboro kun la lokaj kaj fakaj organizaĵoj. Li pretas alporti konsilojn, sed nenian gvidadon de la alilingvaj kursoj. Kaj ĉar la franclingva kurso restos lia propraĵo, kiel li faris ĝis nun, ĉiujn koncernajn elspezojn li kovras mem por la franclingva kurso.

KVINA PUNKTO: Migranta ekspozicio. Claude GACOND organizas la transformon de la siatempa ekspozicio *"Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando"*, kies paneloj restis plej ofte aktualaj dank'al la kompetenteco de la grafikisto Istvan MOROCZ, al

ekspozicio pli malgranda, kiu povos facile migre instaliĝi en lernejoj kaj klubejoj. Tiun ĉi laboron li trankvile plenumas kadre de sia arkivista aktiveco ĉe CDELI. Grave estas, ke por la jaro 2003 li povos planadi ekmigradon de tiu ekspozicio elde inaŭguro okaze de la festado de la centjariĝo de SES. Siatempe li kovris mem la eldonelspezojn de la ekspozicio menciita, kiu restas uzebla kaj deponita ĉe CDELI. Tiel same li mem kovros la eldonelspezojn de la nova ekspozicio. Sed la cirkulado de la ekspozicio dependos de la monhelpoj, kiujn buĝetos SES aŭ aliaj interesatoj.

SESA PUNKTO: Jubilea kongreso. Gravas jam nun ekplanadi la jubilean kongreson, kiu festos la centjariĝon de SES, por ke al ĝi povos aliĝi ne nur svisoj, sed ankaŭ reprezentantoj de alilandaj organizaĵoj. Jam nun en la jaro 2001 devas nepre esti antaŭvidita, kio okazos en la jaro 2003 por marki la centjaran jubileon de SES kaj de la veno de Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT al esperanto. Persone Claude GACOND pretas alporti siajn konsilojn al la planontoj de la aranĝo, kaj se por iu ajn kaŭzo decidiĝos, ke la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds devos iel ajn ludi rolon por la okazigo de tia renkonto, alporti sian helpon kondiĉe, ke nenio estu lastminute improvizita, kiel tro ofte okazas en esperantujo, kaj kondiĉe, ke ekzistos kelkaj sindonemaj agantoj reale pretas plenumi sian funkcion.

En sia kunsido de la sabata posttagmezo 3-a de februaro 2001 la Estraro de SES konstatis, ke reale ekzistas nuntempe rezervo de CHF 15'000 por la Agado 2003 kaj ke inter la kvin punktoj de la programo prezentita de Claude GACOND ricevas prioritaton la punktoj unua (enciklopedio), tria (dosieroj), kvina (ekspozicio) kaj sesa (jubilea kongreso). Pri la realigo de la ceteraj punktoj de la Agado 2003 plene respondecos mem Claude GACOND kaj estas tra lia kanalo, ke SES subvencios la aktivecon de Andy KÜNZLI per CHF 10'000, laŭ la interkonsento, kiu subskribiĝos inter SES, Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI por la realigo de la koncerna punkto (enciklopedio).

Bruno GRAF, prezidanto

# Tutsvisa aktiveco

# CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
✆ 032 967 68 55.
Retpoŝto: gacond@bluewin.ch

sabate la 24-an de marto

## Grava rendevuo kun Herbert Mayer

direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (Austrio)

### Liaj prelegtemoj:

1. Internacia Esperanto-Muzeo.
2. Historio, funkcio, perspektivoj, defioj, danĝeroj...
3. Esperanta literaturo kaj diakronio: lingva evoluo sub la influo de literaturaj tekstoj.
4. La evoluo de poezia lingvaĵo en esperanto.
5. Spertoj de esperanto-eldonisto.

Profitu pri tiu unika rendevueblo kun grava personeco de la hodiaŭa esperanto-mondo. Por minimuma kovro de la elspezoj estos petita partoprenkotizo de po CHF 20 por partoprenanto. Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenontoj bonvolu rete, telefone aŭ poŝtkarte anonci sian aliĝon al Claude GACOND.

### Horaro de la rendevuo:

9h00: Malfermo de salonoj
10h00: malfermo de la rendevuo
10h15-11h00: unua prelego.
11h00-11h15: paŭzo.
11h15-12h00: dua prelego
12h00-12h15: paŭzo
12h15-13h00: tria prelego
13h00-14h30:tagmanĝa paŭzo en najbara italeca restoracio.
14h30-15h15: kvara prelego
15h15-15h30: paŭzo
15h30-16h00:konkluda prelego.
16h00-17h00: en la laborsalono de CDELI eblos aĉeti librojn kaj brokantaĵojn kaj babili teumante.

### Biografieto:

Herbert MAYER (naskita en 1953), aŭstro, aktivas en esperantujo ekde sia 14-a vivojaro. Li studis germanistikon kaj latinidajn lingvojn, instruis poste lingvojn en komerca akademio kaj lingvistikon kaj literaturon en la

universitato de Graz. Ekde 1984 lia profesio estas esperanto: li staĝis unu jaron ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds kaj en 1985 li transprenis la gvidadon de Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) kaj de la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Li verkis plurajn lernolibrojn por germanlingvanoj kaj en 1987 fondis la eldonejon Pro Esperanto kaj poste la eldonan fakon de IEM. Sub lia respondeco en 2001 eldoniĝos jam la 40-a volumo de la Serio Originala Literaturo Klasika.

### Ĝeneralaj informoj:

La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

La enira pordo al la salono de CDELI kaj al la prelegejo troviĝas norde de la biblioteka domo. Indikiloj gvidos vin.

Aŭtomobilantoj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

### Venontaj studsabatoj:

Maje 19: Dua kaj tria rendevuoj kun Karolo PICH: daŭrigo.
Junie 16: Lingvo-analizoj.
Septembre 22.
Oktobre 20.
Novembre 17.

# Ag-raporto

En la jaro 2000 172 novaj libroj estis katalogitaj. Kiel dum la antaŭaj jaroj tiu riĉiĝo de la kolektoj de CDELI ĉefe rezultas el la apogo de eldonejoj, redakcioj, verkistoj kaj de donacoj. Inter la donacintoj de arkivaĵoj estu menciitaj David BÜHLMANN en Pully kaj Lucienne DOVAT en Renens. Per la interŝanĝo de sia bulteno *"SES informas"* SES kontribuas al la riĉigo de la revu-kolektoj de CDELI. La aliaj esperanto-organizaĵoj, kiuj plej grave kontribuis al la riĉigo de la kolektoj de CDELI estas Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds), Svisa Esperanto-Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (Winterthur), Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam), Gesellschaft für Interlinguistik (Berlin) kaj Sennacieca Asocio Tutmonda (Paris. La verkistoj Stefan MACGILL (Hungario), Stanislaw SKORUPSKI (Zürich) ne forgesis havigi al CDELI specimenon de siaj verkoj.

En 2000 esplorantoj venis el Bulgario, Ĉinio, Francio,

Hungario, Nederlando, Pollando kaj Svislando.

Unu el la ĉefaj zorgoj nuntempaj de CDELI estas la akiro de konvena sistemo por la perkomputila katalogado de siaj riĉaĵoj. Tre verŝajne temos pri la sistemo Net/Biblio de la firmao SoftWare Système AG en Niederwangen. André GROSSMANN venis el Mulhouse por akompani Claude GACOND por la unuaj kontaktoj kun programisto de tiu firmao. Cele al la aĉeto de la necesaj sistemo kaj aparatoj kreiĝis fonduso, kiun nutras vendo de brokantaĵoj kaj donacoj. Ĝi estas deponita ĉe SES kaj superis CHF 13'000 fine de la jaro.

En sia aktiveco de arkivisto de CDELI Claude GACOND estas ĉiusemajne helpata po duontage de Andrée GACOND zorganta pri la revu-kolektoj kaj Cosette SANDOZ zorganta pri la registro de la alvenaĵoj.

# Fermo pro ferioj

Kiel por ĉiuj fakaj sekcioj de la Biblioteko esplorontoj kaj vizitontoj estas petataj fiksi rendevuon kun la sekciestro antaŭ sia veno por eviti alveni, kiam li estas for, do kiam la fako estas nevizitebla. Pro feri-kaŭzo dum la venontaj monatoj CDELI estos fermita de la 9-a ĝis la 24-a de aprilo, de la 21-a de majo ĝis la 12-a de junio kaj de la 6-a ĝis la 30-a de julio. Ekster tiuj ĉi periodoj ĝi estas principe vizitebla la matenon lunde, marde, merkrede kaj vendrede. La esplorantoj povas tiam ricevi la dokumentojn, kiujn ili povas poste studadi en la biblioteka legejo dum la malfermaj horoj de la biblioteko.

# KCE

**Kultura Centro Esperantista**
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
✆ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

## Raporto

Okaze de la januara monatfino la fonetikisto Daniele VITALI pritraktis la statuson de la fonemoj J kaj Ŭ en la esperanta alfabeto. Li dementis la vidpunkton de Bertilo WENNERGREN, laŭ kiu la du duonkonsonantoj ne estus apartaj fonemoj. Lia prelego aperos en *"Literatura Foiro"*. Dum la sama renkontiĝo prezentiĝis la nova eldono de *"Paŝoj al plena posedo"* de William AULD, kies akiron kaj trastudon ni konsilas al ĉiu lingvo-

studanto deziranta progresi en sia ellerno de esperanto.

Claude GACOND

## Venontaj aranĝoj

**Marte 31** Matene: Asembleo de LF-koop

**31 - Aprile 1** Lernu pli pri la kuracaj plantoj kun Stano MARCEK.

**Aprile 12-16** Printempa Sesio de Plurnivela Internacia Kursaro, dua grado kun Stano MARCEK, tria grado pri metodiko kun Stefan MACGILL.

**17** Printempa sesio de la Svisaj Esperanto-Ekzamenoj.

**28-29** Psikologio kaj nia ĉiutaga vivo kun Claude PIRON.

**Maje 24-27** Internacia komunista konferenco (responsas IKEK)

**26-27** Kristana kaj naturamika semajnfino ĉe Sunhejmo en Rheineck kun Hans KÄSTLI kaj Sonja BRUN.

**Junie 23-24** aŭ 30-1 julio Omaĝo al Gaston WARINGIEN kun Miĉel DUC GONINAZ kaj Perla MARTINELLI.

**Julie 31 ĝis 20 aŭgusto** Plurnivela Internacia Kursaro (PIK).

Detaloj estas regule publikigitaj en *"Heroldo de Esperanto"* kaj ankaŭ haveblaj ĉe la administrejo de KCE, CP 311, Postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel/Fakso 032 926 74 07. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch . La administrejo ankaŭ prizorgas aliĝon kaj loĝadon de partoprenontoj.

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud Eggenberger, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur ✆ 052 233 47 64

## Ĝenerala Kunveno

La ĝenerala kunveno de SAEF okazos matene la 7-an de aprilo en Konferenzzentrum Galaxy en Bern antaŭ la ĝenerala kunveno de SES, kiu okazos posttagmeze.

Anonco de Dieter ROOKE
por
Internacia Kolektivo de Esperanto-Komunistoj

IKEK-Konferenco okazos ĉe KCE inter la 24-a kaj la 28-a de majo 2001. Aliĝojn sendiĝu al Dieter ROOKE, Äussere Klus 14, 4702 OENSINGEN.

# Loka aktiveco

## Basel

Esperanto-Societo Basel
PF 103, 4005 Basel
✆ 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en Salono ĉe
Haltingerstrasse 97

**Marte 22** 18h30 vespermanĝo en la Restoracio Riehenhof, 20h00: David YAKI prelegos pri "Kiel vendi esperanton?"

## Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"
Case postale 188, 1211 GENÈVE 20
✆ 022 740 04 45
Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des gares, Genève.

### Raporto

La bulteno *"Brasikfolio"* de La Stelo revigliĝis aperigante interalie interesajn historiaĵojn pri la svisa esperanto-movado. Sed ankoraŭ mankas en ĝi kalendaro de la okazontaĵoj.

### Venontaj kunvenoj

**Aprile 3** Programo decidota.
**Maje 1** Programo decidota
**Junie 5** Programo decidota

## Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo
Case postale : 389, 1009 PULLY
✆: (021) 729 58 02
<lausanne.ch @ esperanto.nu>
<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

Ne venis informoj.

## Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
✆ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno

de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

# Raporto

Post la januara kunveno, dum kiu ni ĝuis la prelegon de David YAKI kun la multaj novaj ideoj por la vendo de esperanto, nia Ĝenerala Kunveno je la vendredo la 16-a de februaro okazis en tradiciaj, trankvilaj reloj. Tamen tio ne tute pravas: tradicie jes, sed trankvile ne. Kial? Ĉar en la regiono de Luzern oni estas meze en la karnavala sezono. Sekve la karnavala etoso ne mankis, bona humoro regis. La ordinaraj traktaĵoj kaj proponoj aprobiĝis en demokrata maniero. La estraro ricevis la 'taskon', nepre buĝeti por kuna vespermanĝo kompence por la laboro farita, Rosa METTLER elektiĝis kiel dua kaskontrolanto. Tre tradicie estis la voĉdono por nova leterkapo. Post kelkaj proponoj pri modernigo, la Ĝenerala Kunveno decidis resti ĉe la ĝisnuna! Ja do, ne ĉio nova estas ankaŭ bona.

Sed io estis nova kaj bona: kiel gasto ĉeestis Giuseppe CASTELLI, juna itala esperantisto, antaŭnelonge veninta al centra Svislando pro profesiaj kaŭzoj, li aliĝis al la societo kaj proponis okupiĝi pri la junulara flanko de nia agado.

Por Lucerna Esperanto Societo

Sonja BRUN

## Programo

**Marte 15** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: Impresoj pri Pollando kun Louise BACHMANN.

**Aprile 04** en Simplon.

**19** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Historio kaj principoj de Bahaismo kun Rosa METTLER.

**Maje 02** en Simplon.

**17** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Biografietoj de famaj komponistoj kun Paul SCHERER.

**Junie 06** en Simplon.

**21** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Demandluda ekzameno pri la Originala Verkaro de ZAMENHOF kun Dieter ROOKE.

**Junie 30** sabate: Ekskurso kun Anĝelo MELLINI.

**Julie 04** en Simplon.

**Aŭguste 23** ĵaŭde 19h00: kolektiĝo ĉe "Emmenbaum" por promenado kaj poste humura literaturo kun Soja BRUN.

**Septembre 05** en Simplon.

**20** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Infanoj kaj bestoj kun Monika RUCKLI.

**Oktobre 18** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: Historio kaj fabrikado de salo kun Annelis DETTLING.

Novembre 07 en Simplon.

15 ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: kompilado de la programo 2002.

Decembre 05 merkrede 14h00-16h00 en Simplon: Zamenhofa posttagmezo kun Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN.

2002 Januare 09 en Simplon.

18 vendrede 19h30: paroliga leciono, 20h00: Vojaĝo tra Venezuelo kun Margrit E. BRÜGGER.

# Kantono de Neuchâtel

**Fondua vespero kun Herbert Mayer okazos merkrede la 21an de marto.**

Per cirkulero la esperantistoj de la regiono ricevos la ĉi-koncernajn informojn kun aliĝilo.

## Studaj rondoj ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND. Marde okaze de koncerto la merkredon.

## Venontaj kunvenoj

Plenkreskuloj:

marte 13 kaj 28

aprile 25

majo 10

junie 13 kaj 27

Geknaboj:

Regule la mardon de la 17h00 ĝis la 17h45.

# Wil

**Esperanto-Klubo Wil**

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ✆ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Ne venis informoj

# Zürich

**Esperanto-Societo Zürich**

PF 858, 8034 ZÜRICH ✆ 01 251 50 25

<info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an lundon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich

Ne venis informoj.

# Morto Lilly Schaerer

(1905 2001)




La honora membro de SES Lilly SCHAERER mortis naŭdeksesjaraĝa la 19-an de januaro 2001. Ŝi naskiĝis en Schaffhausen la 13-an de septembro 1905, kaj frekventis la lernejojn en Langenthal, kie ŝi eklogis familie ekde 1913. En tiea komerca lernejo ŝi diplomiĝis en

1925, kaj de tiam ŝi laboris komerciste kaj libroteniste en Basel kaj Zürich, antaŭ ol reveni en Langenthal en 1940 por deĵori kiel sekretario kaj librotenisto en teksaĵejo-kolorejo. Apudprofesie ŝi aktivis ne nur en la esperanto-movado, sed ankaŭ en kant-societoj kaj en lingvo-studaj kluboj, interalie en alemana amik-aro al la franca lingvo.

Estas kadre de tiu medio, ke ŝin mi vidis lastfoje en 1999. Tiam 94-jaraĝa ŝi gvidis dudekon da koleginoj kultivantaj la francan lingvon, kiuj deziris informiĝi pri esperanto. Ŝi kondukis ilin al CDELI, kiun ili vizitis kun granda intereso. Post komuna tagmanĝo ŝi nelacigeble daŭrigis sian ĉiĉeronadon kondukante siajn koleginojn al la horloĝa muzeo de La Chaux-de-Fonds. Vere vigla oldulino ŝi ankoraŭ restis!

Lilly SCHAERER lernis esperanton en 1932 okaze de Cseh-metoda kurso gvidata de Tiberio MORARIU en Zürich. Kaj ŝi fieris rakonti, ke la ekzamenon de la supera diplomo ŝi trapasis sub la severa sed afabla kontrolo de Edmond PRIVAT. Kaj ekde tiam ŝi aktivis favore al la diskonigo de esperanto ĉefe kadre de la Centra Komitato de SES kiel sekretario kaj librotenisto. La societon ŝi eĉ prezidis de 1957 ĝis 1960. Dum verŝajne pli ol 30 jaroj ŝia privata adreso estis samtempe tiu de SES, kio donis stabilecon al nia svisa movado. Okaze de la 64-a Universala Kongreso en Luzern ŝi deĵoris kiel ĝia librotenisto.

Ekde mia esperantiĝo en 1952 mi havis multajn rilatojn kun ŝi, ĉar ŝi ŝatis partopreni la semajnfinajn aranĝojn de Esperanto-Junularo de Svislando kaj de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kaj ŝi ĉiam pretis lingve helpi al la komencantoj. Kiam David BÜHLMANN eklernis la lingvon, kiun li ekkonis kadre de laborrest-ado de Servo Civila Internacia, estas Lilly SCHAERER, kiu estis lia instruanto en Langenthal.

Inter la plej belaj kaj sukcesaj semajnfinoj de SES nombriĝas tutcerte tiuj, kiuj okazis en Langenthal sub la duopa gvido de Lilly SCHAERER kaj David BÜHLMANN fine de la kvindekaj jaroj. El la unua datumas la karikaturo de Istvan MOROCZ, kiu atestas, ke Lilly tre serioze, eble eĉ iom triste, aŭskultis la diskutojn, disputojn eĉ, en la ĝenerala kunveno de SES. Tiun SES-renkontiĝon, en kiu nia jun-ulara delegacio el La Chaux-de-Fonds prezentis teatraĵon, mal-fermiĝis per kantoj de la koruso de Langenthal. La duan aranĝon vigligis dancoj de la japanino

Joŝiko KAJHINO, antaŭ ol promenado al la baroka preĝejo de Sankt Urban perdigis nin dum iom panika horeto en vasta arbaro.

Lilly SCHAERER, vi provis vigligi la esperanto-movadon. Kaj okaze de via lasta renkontiĝo en La Chaux-de-Fonds vi plendetis pri la esperanta dezertiĝo en via alemana regiono. Mi povis respondi al viaj amaraj sentoj, ke almenaŭ ne vi mem kulpis pri la koncerna nefavora disvolviĝo, ĉar mi scias, kiom nelacigeble vi plenumadis vian funkcion de SES-sekretario fakte ĝis la jubilea jaro 1987-a, kiam okdekdujara vi sentis la bezonon emeritiĝi el via funkcio.

Kara Lilly, nome de esperantujo, dankon al vi!

Claude GACOND, kun la dokumenta helpo de Andy KÜNZLI.

# Babylonia

Nicole MARGOT rememorigas, ke la prunteblaj numeroj de la revuo *"Babylonia"*, al kiu SES abonas ekde 1999, estas deponitaj ĉe ŝi. Jen ilia listo:

1998-1: Plurlingvismo kun enketo de Tazio CARLEVARO pri la svisaj esperantistoj.
1999-1: Eŭropa foliaro de la lingvoj.
1999-2: Plurlingva edukado.
1999-3, Franca Lingvo CH..
1999-4:Plurlingva instruado.
2000-1: Pripensi la spertojn en lernado kaj taksi la rezultojn.
2000-2: Itala lingvo CH.
2000-3: Lernolibroj por la instruo de dua lingvo.

Estas ankaŭ pruntebla la raporto 1999-a de la fondaĵo "Lingvoj kaj kulturoj", kiu eldonas la revuon *"Babylonia"*. Verkita en la itala, ĝi estas resumita german- kaj franclingve. En ĝi ni legas:

- ke la fondaĵo kapablis plibonigi sian financan staton kaj plifortigi la pozicion de la revuo dank'al pluraj partneriĝoj (kiel Eŭropa Konsilantaro, Asocio por plurlingva Instruado kaj Romanda Loterio).
- ke la "Manifesto favore al la lingvoj", ankaŭ subskribita de SES, ne ricevis la sukceson atenditan. Nur 148 personoj subskribis ĝin (la revuo havas 776 abonantojn).
- Kolokvo pri "Fremdaj lingvoj kaj formado de plenkreskuloj: nova aliro ekde la tria jarmilo". estis organizita en Chur kunlabore kun Migros-Lernejo. Ĝi grupigis 70 partoprenantojn.

Pruntemuloj sin turno do al Nicole MARGOT, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne.

# Libroj

## Hel

Sigurdur NORDAL: Hel. El la islanda tradukis Wilhelm Theodor OESTE. Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, 1996. 20-a volumo de la kolekto Plejado. 74p.

Novaj libroj alvenintaj ĉe CDELI post la danka ceremonio tuj iras al la skribotablo de Cosette SANDOZ, por registriĝi en la katalogo. Tiel ili akiras sian serĉ-kodon. Inter libraro la romano *Hel* tuj vekis legemon ĉe Cosette SANDOZ pro sia plaĉa aspekto kaj arta kovrilo de Tihamér KISS, kaj ŝi prenis la libron por ĝin legi hejme.

La sekvan semajnon la libron akompanis tiu ĉi legimpreso de Cosette SANDOZ, kiun mi publikigas kun la espero, ke ĝi instigos multajn akiri la romanon *Hel*:

*"Se vi havas emon al poezio aŭ al saĝeco, aŭ al ambaŭ, gustumu la maldikan libreton Hel. Legante ĝin grandajn ĝojojn mi trovis tiel en la lingva uzo kiel en la profunda signifo. Ĝi estas pripensinda kaj eĉ se mi ankoraŭ ne ĉion komprenis, tiu proza verko el Islando multon alportis al mi".*

Mi aldonos al tiuj vortoj de Cosette SANDOZ miajn gratulojn al Lina GABRIELLI. La menciita verko *Hel* fakte, kiel estas skribite en ĝia eldonista antaŭparolo, per sia apero festis la dudekan jaron de la kolekto *Plejado*, kies unua eldonaĵo en 1975, *Dudekkvar sonetoj* de Louise LABE, jam estis traduko de Wilhelm Theodor OESTE. En 20 jaroj Lina GABRIELLI, per sia eldonista aktiveco, donis al esperantujo 20 perlojn de la mondliteraturo. Ŝi meritas niajn dankojn.

Claude GACOND

## Paŝoj al plena posedo

William Auld: Paŝoj al plena posedo: perfektiga krestomatia lernolibro. Kooperativo de Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds, 2001, 3-a eldono reviziita kaj kompletigita. 202p.

Viglan ĝojon alportis al mi trafoliumo de la tria eldono de la nun fama kaj didaktike utilega verko de William AULD, ĉar ĉiupaŝe la papago Pepo humurplene respegulas la rakontajn eventojn. Dankon al ĝia desegnista patro Martin MARKARIAN, kiu per sia talento vigle vekos ĉe studantoj legemon kaj ĉe instruantoj amuzon.

Claude GACOND

P.P.
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

# Por viaj ferioj

Ni atentigas ĉiujn, kiuj ŝatas kombini interesan feri-vojaĝon kun kleriĝo rilate al esperanto mem, pri la venonta

## Internacia Esperanto-Konferenco

en Strážnice, Moravio, Ĉeĥio, kies preleg- kaj debat-temo estos la esperanto-verkisto Karolo PICH kaj liaj mondoj.

La konferenco mem disvolviĝos de la 14-a ĝis la 20-a de julio en la moravia urbeto Strážnice en Ĉeĥio. Ĝin karakterizos prelegoj kaj debatoj, lingvo-kursoj, libro-servo, ĉiĉeronado ĉe lokaj vidindaĵoj kaj voĉdonado pri OSIEK-premio.

Prelegos:

Ed BORSBOOM pri la beletraj verkoj de PICH kaj la poezio en la verkaro de PICH.

Christian DECLERCK pri la esperantologiaj verkoj de PICH kaj pri la virino en la verkaro de PICH.

Claude GACOND pri esperanto-didaktiko kaj PICH.

Claus GÜNKEL pri neologismoj kaj piĉaĵoj.

Mirolslav MALOVEC pri PIC kaj la politiko.

Tuj post la konferenco de la 21--a ĝis la 23-a de julio post-kongresaj ekskursoj vizitigos interalie Litomiŝlon, la urbon de Karolo PICH.

Por ricevi detalajn informojn kaj aliĝilon pri tiu ĉi certe tre interesa esperanto-renkontiĝo oni sin turnu al: Eric LAUBACHER, 1 rue de Bougainville, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux (Francio). Telefono: +33 (0) 130 96 67 91. Retadreso: ericl@iname.com.

**Esperanto-Centro Kvinpetalo**
Rue du lavoir, FR-86410
Bouresse (Francio)
Tel. kaj fakso: 0033 549 42 80 74
kvinpetalo@club-internet.fr

Stuemuloj kaj feriemuloj petu la detalan kurs-informilon kun la partoprentarifoj